

NORMANDA ESPERANTO BULTENO



ESPERANTO - NORMANDIE

Redaktas : Pierre Lemarchand, 2 résidence les Terres Quemines 76113 Hautot-sur-Seine.
Tel. 02 35 34 28 78 LEMARCHANDPI@wanadoo.fr

Abon-kotizoj : 8 Eŭroj . Esperanto - Normandie. C.C.P. 283.40.H Rouen.
La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la enhavo de la artikoloj kaj opinioj de la unuopaj aŭtoroj.

KONGRESO kaj ankaŭ GRANDA FESTO

Mi kun mia edzino partoprenis la Inter-asocian Renkontiĝon de Esperanto ĉe Mediteraneo, en Sète de la 22a ĝis la 26a de Aprilo 2011.

Fakte, okazis pluraj kongresoj ĉar ĉiuj esperantistaj asocioj kiuj ekzistas en Francio organizis sian propran ĝeneralan kunvenon : Esperanto-France, SAT-Amikaro, Fervojistoj, Katolikoj, EDE (Europe Démocratie E°), FET (Fédération Espérantiste du Travail) kaj aliaj...

Ĉiuj akordiĝis por komune renkontiĝi. Jam, en 2005, okazis simila evento, en Boulogne-sur-Mer. Temis pri jubilea kongreso memore al la fama unua internacia kongreso kiu okazis unu jarcenton antaŭe en la sama urbo.

Aliĝis la renkontiĝon 367 homoj inter kiuj 53 eksterlandanoj. Mi havis okazon paroli kun Japanino kiu estis en Hérouville la antaŭan semajnon. Bedaŭrinde la nombro da Normandaj partoprenantoj estis tre malgranda : Suzanne kaj Claude Helbert de Grand Couronne (76), Christian Levesque de St Michel des lousps (50). Mia edzino kun mi de Grand Quevilly (76)

La loko estis tre taŭga por tia renkontiĝo : estas feriejo (Centre de vacances) kun multaj dormĉambroj, grandaj manĝoĉambroj kaj salonoj por diversaj diskutoj kaj prelegoj.

Alveninte per trajno en Sète, jam estis kreita la etoso en stacidomo ĉar laŭparoliloj salutis esperantlingve la partoprenantojn. Gedejorantoj indikis kiamaniere atingi la kongresejon per urbaj busoj. Ni forlasis Normandion kun bela, varma vetero ; ni alvenis al sudo de Francio kaj havis malagrablan surprizon konstatante ke temperaturo estas malpli varma ; malkvieta estis la maro kaj eĉ pluvetis. Sed tio ne daŭris kaj ni povis ĝui ekskursojn kun bela suno.

La programo estis tre riĉa kaj estis neeble profiti ĉiujn aranĝojn. Mi ĉeestis ĝeneralan kunvenon de SAT-Amikaro ; mi intencis ĉeesti kunvenon de Esperanto-France ĉar mi estas membro de ambaŭ asocioj sed ŝanĝo en la programo ne ebligis tion.

Post vespermanĝoj, ĉiuvespere okazis spektakloj : Jacques Yvart koncertis kantante kanzonojn de Georges Brassens ĉar Sète estis la urbo kie naskiĝis kaj vivis la fama kantisto. Dominique Gautier prezentis sian dokumentfilmon pri Esperanto. La ensemblo « Kaj tiel plu » prezentis repertuaron de tradiciaj melodioj okcitanaj kaj katalunaj. Patric kantis okcitanajn kanzonojn. La frisa grupo « Kapriol » dancigis la spektantojn. Teatra Trupo de Tuluzo prezentis teatraĵon kiu interesis kaj amuzis publikon. Apoteoze, Jomo, la dancensemblo Solnička kaj la muzikistoj de la grupo « La liberecanoj » prezentis spektaklon kun slava etoso kiu entuziasmigis la kongresanojn

Prelegoj estis multaj kaj tre diversaj. Eblis trapasi diversgradajn ekzamenojn.

Ekskursoj ebligis traviziti regionon tre pitoreskan : Etang (lageto) de Thau, Cap d'Agde, Camargue (Maguelone, Aigues Mortes, Saintes Maries de la Mer).


Do pli ol kongreso, tiu renkontiĝo estis vera festo en ferieja loko. Domaĝe ke normandoj estis tiel malmultaj.

PETRO KIJŲ

En tiu numero :

Prelego en Hérouville Turneo de Trevor Steele	2
Japanino atestis	3 - 4
Verkoj pri Bas-normandio	5
Kotizintoj	6
L'espéranto au bac	6





HEROUVILLE-ESPERANTO

Après les tremblements de terre, le tsunami et la catastrophe nucléaire,



Keiko SANPEI

espérantiste japonaise de **SENDAI**

témoignera

LUNDI 18 AVRIL 2011 à 17h30

Mairie de Hérouville St Clair

Traduction assurée par des membres de l'association
HEROUVILLE-ESPERANTO

En la bela kaj vasta ĉambro kie kutime kunsidas la urbestro en la urbodomo de Hérouville, **kvindek** personoj ĉeestis la **18an de aprilo 2011**.

Tie, kun granda atento kaj intereso ili aŭskultis nian amikino **Keiko SANPEI** kiu, dum pli ol unu horo kaj duono parolis pri la tertremo kaj la cunamo kiuj okazis la 11an de marto.

Keiko tiel pasie raportis pri sia sperto kaj la familia dramo de sia najbaro en Sendai, ke la tradukantoj malfacile povis sekvi sian tro fluan paroladon kaj la publiko foje restis kvazaŭ senvoĉe!

Tamen pluraj aŭskultantoj retrovis sian parolkapablon kiam temis pri la nuklea katastrofo de Fukushima

Post la parolado, pluraj personoj, impresitaj de la facila komunikado inter Keiko kaj la tradukistoj demandis nin pri nia lingvo.

Koncerne la lingvon, mi ne mankis rilati pri la nombraj atestoj kaj raportoj kiuj alvenas el Japanio danke al nia esperanta reto kaj mi substrekis kvaliton de niaj internaciaj rilatoj.

Gérard SENEAL

Baldaŭ AŬSTRALIANO en CAEN

Por la unua fojo **Trevor STEELE** prelegvojaĝos en Francio.. La turneo okazos fine de oktobro. Ek de nun bonvolu rezervi tiujn datojn : li estos en **CAEN** de la **18a ĝis la 20a de oktobro 2011**.

Aŭstraliano, li pasigis kvaronon de la vivo en aliaj landoj. Li laboris ĉefe kiel lingvoinstruisto, sed ankaŭ kiel socialhelpisto en Germanio, kaj dum kelkaj jaroj kiel ĝenerala direktoro de UEA. Li multe instruis Esperanton (kaj la anglan kaj germanan) per la rekta metodo en diversaj landoj (ĉefe Pollando kaj Litovio).

Pasigis 1977 kaj duonon de 1995 en la Esperanto-komunumo *Bona Espero* en Brazilo.

Verkis vaste en Esperanto por periodaĵoj kaj novelaroj, kaj aperigis jenajn verkojn:

Romanoj : Sed nur fragmento ; Neniu ajn papilio ; La fotoalbumo, vol.1 kaj 2 ; Kaj staros tre alte ; Kvazaŭ ĉio dependus de mi ; Flugi kun kakatuoj ;

Novelaroj : Memori kaj forgesi ; Australia felix ;

Kolektoj da eseoj, noveloj, vojaĝrakontoj, recenzoj : Falantaj muroj ; Diverskoloro.



Pri kio Trevor STEELE povas paroli ?

Pri la enhavo de siaj verkoj (sufiĉe variaj laŭ temoj, tempoj, kaj lokoj), kaj aparte pri la aborigenoj de Aŭstralio, inter kiuj li vivis dum 1,5 jaroj. Krom la du vizitoj al Brazilo, la restado de unu jaro en Sovetunio provizis multe da diskuttemoj.

Do, ne hezitu veni en CAEN / Hérouville, je tiuj datoj por renkontiĝi kun li. Precizaj informoj (lokoj, datoj, horoj) aperos en nia septembra numero.

Japana esperantistino atestis en la urbodomo de Hérouville-Saint-Clair

De pli ol dek jaroj, nia klubo Hérouville-Espéranto teksis privilegiajn rilatojn kun Japanio. Tio klarigas kiom estas kortuŝitaj la eruvilaj esperantistoj pri la nuklea katastrofo kiu sekvis la tertremo kaj la cunamo okazintaj la 11an de marto 2011.

Keiko SANPEI, kiu loĝas en Sendai, planis vojaĝon tra Francio kaj Britio longe antaŭ la dramaj eventoj. Kuraĝe ŝi ne rezignis sian programon kaj diversloke ŝi atestis pri la katastrofo, el sia propra sperto. Ĉiam ŝi parolis antaŭ esperanta aŭskultantaro.

Hérouville-Espéranto deziris ke tia valora atesto profitu al ĉiuj. Pro tio, helpe de la urbodomo, ni organizis publikan renkontiĝon en la granda ĉambro kie kutime kunsidas la urba konsilio.

Tial, la 18an de aprilo, kvindek da ĉeestantoj tre atente aŭskultis nian japanan amikino. Krom dek-kvinkelko da lokaj esperantistoj, multaj neesperantistoj ĉeestis, interesataj de rekta interŝanĝo kun atestanto kiu mem travivis la eventojn.

Tradukon de la esperanta al la franca kaj inverse, por respondi la demandojn de la publiko, kelkaj eruvilanoj faris dum la kvazaŭ duhora renkontiĝo.

La katastrofo :

Keiko parolis pri la cirkonstancoj de la tertremo kaj la cunamo :

« Mi loĝas sur monteto ekster la urbo, 10 kilometroj for de la centro de Sendai. Mi estis leganta. Ĉio tremis kaj elektro haltiĝis. Mi ege timis la falegon de la tegmento sed nur la mebloj renversiĝis kaj ĉiuj libroj falis el la bretoj. La cunamo alvenis post dudeko da minutoj. La ondego transpasis la digon kaj kunportis ĉion, domojn, homojn, ŝipojn... La domoj iuflanke foriris kaj revenis aliflanke pro la dua ondo ! Multaj homoj provis fuĝi sed nekalkulebla kvanto pereis. La tute detruita marbordo etendiĝas 500 kilometroj longe kaj oni kalkulas tridek mil mortintojn kaj malaperintojn. »

Keiko rakontis tiel fervore ke la tradukantoj devis malrapidigi ŝin !




Nia japana amikino
Keiko SANPEI kun
Gigi kaj Gérard
SENECAL

Paĝo 4a

Ŝi longe kaj emocie rememorigis :

« Mia najbaro post la katastrofo ne povis viziti la gepatran domon pro manko de benzino kaj uzeblaj vojoj. Kelkajn tagojn poste, kiam li finfine sukcesis atingi la lokon, li trovis la korpojn de siaj familianoj disĵetitaj inter amaso da kadavroj . »

La zorgado de la elsavitoj :



Keiko respondis demandon de la aŭskultantaro :

« Teorie la Ŝtato prizorgas la homojn en la regiono kiu pli multe suferis. Certe helpoj alvenis sed troviĝas tro multaj rifuĝintoj do, tio ne sufiĉas ! Feliĉe el la tuta Japanio kaj ankaŭ el fremdaj landoj alvenas solidarecaj donacoj. Sed precipe la solidareco inter familianoj, amikoj kaj najbaroj efike helpas la homojn post-vivi. Familianoj sendis trajnbiletojn, tre multekostajn aŭ malfacile akireblajn, por

helpi la elsavitojn kiuj deziris rifuĝi aliloke. La geamikoj kaj najbaroj ofte kunportas nutraĵon kaj vestaĵojn al tiuj kiuj surloke restas. »

La estonteco :



Pri la estonteco de la regiono, Keiko estas malplirigora :

« Ni ne timas ekonomian solecon ĉar entreprenistoj kaj mecenatoj sin devontigas ekde nun investadi en la regiono kaj ni multe kalkulas je la granda solidareco de ĉiuj Japanoj. Kompense, pri la nukleaj industrioj, ni estas maltrankvilaj. En Japanio ni travivis Hiroshima kaj Nagasaki, do ĉiuj scias kaj timegas la danĝerojn. La registaro provas trankviligi la loĝantaron asertante ke nenio danĝeras, ke la kovriloj de la centraloj estas tre fortaj... sed la cunamo pasis super ili. Neniu imagis tian amplekson ! »

Gérard SENEAL

Tri verkoj pri Bas-Normandio

Bas-Normandio estas lulilo de kelkaj famaj verkistoj, **Malherbe** (Caen) «Et Rose elle a vécu ce que vivent les Roses, l'espace d'un matin», **Octave Mirbeau** (Trévières) « Taglibro de servantino », kaj nun **Gilles Perrault** kiu loĝas en Sainte-Mère-Eglise « La ruĝa pulovero ». Sed iliaj verkoj ne havas rilaton kun nia regiono.

Malmulte da grandaj romanoj okazas en Bas-Normandio, sed kiel forgesi la belan novelon de **Flaubert** « Simpla koro » kies unua frazo estas « Dum duona jarcento, la burĝinoj de Pont-l'Évêque enviis Sinjorinon Aubin pro ŝia servantino Félicité », kaj, kompreneble, la verkojn de **Proust** kun ofta kadro la Granda Hotelo de Cabourg ?

Plej multaj libroj kiuj pritraktas nian regionon havas rilaton kun historio, Vilemo la Konkeranto kaj la bataloj de la dua mondmilito. Ekzemple legindas la ĵus aperinta libro de **Pierre Bouet** «Hastings, la 14an de oktobro 1066 ». La aŭtoro rakontas kiel Vilemo preparis la invadon de Britio kaj kiel li venkis post unutaga sed tre malcerta batalo.

Antaŭ nelonge aperis tri verkoj okazantaj en Bas-Normandio, de aŭtoroj diverskiale konataj.

En februaro 2010 aperis kun granda sukceso « La kajo de Ouistreham » de **Florence Aubenas**. Tiu "granda reportero" por la ĉiusemajna gazeto « **Nouvel Observateur** » dum 6 monatoj forlasis siajn laboron, amikojn kaj familion por vivteni kiel purigistino. Ŝi serĉis laboron ĉe "Pôle Emploi" kaj laboraj agentejoj kaj luprenis ĉambron apud la stacidomo de Caen. Por kompreni la vivon de tiuj laboristoj, ŝi fariĝis vera laboristino kiu laciĝas kun siaj kolegoj kaj estas sub la jugo de aĉaj labor-kondiĉoj. Dank'al ŝia raporto, la leganto pli bone komprenas kiel la nuna vivo de tiuj «bazaj» laboristoj estas kruela, en la manoj de senindulgaj entreprenistoj. La libro havis grandan sukceson sed mi dubas ĉu la legintoj emos viziti nian regionon kaj la urbon Caen ĉar Aubenas vidas ilin nur per nigraj kaj tristaj koloroj. Tamen tre leginda libro por tiuj kiuj opinias, ke ni nepre batalu por pli bona socio.

Riva Bella estas turista strando apud Ouistreham. Tie, **Patrice Leconte** pasigis siajn infanaĝajn feriojn kaj ŝatas reveni por ĝui la grandajn plaĝojn kun fajna sablo. Li famas pro ridigaj filmoj kiel « La bronzuloj », « Gastu ĉe mi, mi loĝas ĉe amikino », «La edzo de la frizistino », sed ankaŭ pli seriozaj filmoj « Sinjoro Hire » aŭ « Ridinde ». Lia dua ĵus eldonita romano « **Riva Bella** » estas leĝera legaĵo kun magiisto kies spektakloj okazas en la riva-bela kazino. Sed lia lerteco ne helpas lin gardi sian edzinon. Libro rapide legita kaj forgesita. Sed alloga virino en bankostumo sur la frontpaĝo...

Jean-Louis Ezine ankaŭ verkas en "Nouvel Observateur" kaj estas aŭdebla pri literaturo dum la fama « La Masko kaj la Plumo » ĉe France Inter. Oni konas lin kiel humurplenan kaj ĝojan ĵurnaliston sed en lia lasta verko « **La silentemuloj** » regnas tute alia etoso. Li rakontas sian junecon en Lisieux kaj aliaj bas-normandaj lokoj kiam li suferis pro bopatro senama, silenta, kaj perforta kontraŭ lia patrino. Lia vivo estis/estas senĉesa serĉado pri sia vera patro. Intelekta prizonejo sed ankaŭ fonto de granda energio por batali kontraŭ malfavora sorto kaj baldaŭ atingi unuajn rangojn sur la kulturaj kaj eĉ sportaj kampoj. Tre interesa kaj mirinda libro.

Dank'al legado de tiuj teme kaj stile malsamaj libroj, vi havu deziron baldaŭ viziti Bas-Normandion !

Hastings, 14 octobre 1066. Pierre BOUET.
Tallandier 2010.

Le quai de Ouistreham.
Florence AUBENAS. L'olivier 2010.

Riva Bella. Patrice LECONTE.
Albin Michel 2010.

Les taiseux. Jean-Louis EZINE.
Gallimard 2010.

Yves NICOLAS

ESPERANTO - NORMANDIE

Une ouverture sur tous les peuples, toutes les cultures



Listo de kotizintoj por 2011

Rigardu ĉu via nomo estas en ĉi-suba listo : Jam pagis por 2011, ge-Sinjoroj :

BADMINGTON, BATAILLE A., CARON, CHALM, COLOMBEL, DEFRANCE, DUBOIS, DUBUC, DUFEU, DUFRESNE, EL BAHRI, EVRARD, FRESLON, GASCOIN, GIBERT, GROULT, GUEROUT, GUILMOT, HELBERT, JOURDAINE, JOUVIN, LANGEAIS, LARDEUR, LEBRETON, LECOUVREUR, LEMARCHAND, LEMELTIER, LEONARD, LEPERD, LEPREVOST, LESUEUR, LEVESQUE, LOISEL, LONGUET, MAGEREL, MARIE, MAURAU, MICHAUD, MILLET, MULOT, NARDIN, NICOLAS, PAUMIER, QUILLAUD, RAUCH, ROBIOLLE, ROUSSEAU H., ROUSSEAU J., SCHERTZER, SENEAL, SERY, TAILPIED, THIERRY, ZILLIOX.

Faru vian ĉekon profite de **ESPERANTO-NORMANDIE CCP 283 40 H ROUEN** Abon-kotizo por 2011 : **8 Eŭroj**, kaj sendu ĝin al la kasisto :

Pierre Lemarchand, 2 Résidence Les Terres Quemines. 76113 Hautot sur Seine.

Cotisation

2011



Une croix rouge dans cette case indique que vous n'êtes pas à jour de votre règlement. Merci d'envoyer votre règlement (8 Euros à l'ordre d' « Esperanto - Normandie ») à l'adresse indiquée ci-dessus. Merci pour votre soutien !

**PÉTITION
pour l'
espéranto
au
baccalauréat**

**Signez et
faites signer
la pétition**




« Je reçois comme un honneur la proposition que me font les deux associations Esperanto-France et Sat-Amikaro de parrainer cette pétition en faveur de l'espéranto. Je souhaite que l'enseignement de l'espéranto soit officialisé par les autorités de nombreux pays. Un jour viendra où tout être humain saura utiliser l'espéranto comme un instrument de mise en commun. »

ALBERT JACQUARD

Les associations faisant sa promotion en France s'unissent pour demander une reconnaissance officielle dans le système éducatif par son introduction dans la liste des langues admises en tant qu'option au baccalauréat.

Signez et faites signer la pétition : Campagne espéranto au bac, 17 rue du Cambeilhau 64400 Oloron Sainte-Marie



L'étude de l'espéranto fait aimer, facilite et accélère l'étude des autres langues. Ainsi il favorise le plurilinguisme.

WWW.ESPERANTO-AU-BAC.FR